

KUNVOKO

al la Jarkunsido de Kulturdomo de Esperanto

la 18an de majo 2019 en kastelo Greziljono je la 14a 00

La jarkunveno okazos sabaton, la 18an de majo 2019. Registrado de la ĉeestantoj komenciĝos je la 13a 30 en salono Zamenhof. Dimanĉon okazos Komitatkunsido. Dum la semajnfino, la kastelon okupos grupo de luantoj: ni okupos nur la kromdomojn.

Societano, kiu ne povos ĉeesti, bonvolu nepre sendi sian rajtigilon per poŝto aŭ retmesaĝo. Vidu la lastan paĝon

Tagordo

- 1) elekto de la prezidanto kaj sekretario de la kunsido,
- 2) nombrado de la ĉeestantoj kaj de la rajtigiloj,
- 3) evoluo de la nombro de la societanoj, kontrolo de la kvorumo,
- 4) agadraporto 2018, diskuto kaj voĉdono (dum la kunsido),
- 5) financa raporto 2018, diskuto kaj voĉdono (dum la kunsido),
- 6) aprobo de la kontoj pri la jaro 2018 kaj imputo de la profito 2018.
- 7) buĝeto 2019,
- 8) kvitigo al la Komitato,
- 9) konstrulaboroj: aktuala situacio kaj prioritatoj,
- 10) aliaj demandoj.

Evoluo de la nombro de societanoj

La 31an de decembro 2018, kalkulinte forpasojn, donacojn de societaj partoj, perdon de societanecon, se oni ne donis vivsignon dum tri jaroj, restis 236 societanoj kun 880 societaj partoj A (je 16 €). 429 societaj partoj B (je 200 €) estis akiritaj. Dum la jaro 2018, 1 nova societano aliĝis, 18 societanoj donacis siajn societajn partojn, 8 societanoj forpasis, 5 societanoj estis forigitaj (sed reakiris societanecon se ili petos) kaj 1 societano aĉetis kromajn societajn partojn A. 8 societanoj aĉetis 225 societajn partojn B.

Agadraporto

La jaron 2018 markis manko de daŭra ĉeestanto en la kastelo, la deĵoron por luadoj certigis kelkaj administrantoj. Isabelle Nicolas ĉeestis inter 2014 kaj 2017.

Dum la jaro 2018, la kastelo estis okupita dum 194 tagoj, t.e. 53 % de la tempo: 52 tagoj da staĝoj, 62 tagoj da ludonoj, 73 tagoj da konstrulaboroj, 2 tagoj da ne-eperantistaj aranĝoj kaj 5 tagoj por la jarkunveno, komitatkunveno kaj aliaj kunvenoj surloke aŭ telefone. Preskaŭ ĉiuj semajnfinoj inter la 15a de marto kaj la 11a de novembro estis okupitaj, al kio aldoniĝis 3 laborsemajnfinoj kaj 3 semajnfinoj luigoj en la malvarma sezono. Vidu la aktivecon rete sub: gresillon.org/a2018.

La staĝo PRINTEMPaS, de la 20a ĝis 28a de aprilo, kun intensaj kursoj, kunigis 39 ĉeestantojn, el kiuj 10 trapasis la KER-ekzamenon. La kursojn gvidis Przemek Wierzbowski, Christophe Chazarein kaj Marion Quenut. La ekzamenantaro konsistis el Katalin Kovats kaj François Lo Jacomo. Jannick Huet staĝestris kaj Thierry Charles kuiris.

La vegana renkontiĝo ReVe, samtempe kun la renkontiĝo de la ĥoro Interkant, kunigis 54 ĉeestantojn de la 9a ĝis 13a de majo. Jannick Huet ĥorstaĝestris, Zdravka Lenepveu ĥorestris. La renkonton ReVe kaj veganan kuiradon estris Paŭlino Gaborit, Vito Markov, Ŝtonĉjo Soubourou. Koncertis Jonny M.

La 4 someraj staĝoj okazis dum respektive 7, 5, 6 kaj 8 tagoj, entute 26 tagoj.

La kvara semajno de reciprokaj interŝanĝoj de scioj kaj scipovoj, de la 9a ĝis la 16a de julio, kiun staĝestris Elisabeth Barbay kaj Isabelle Nicolas, kunvenigis 23 membrojn de SEL, JEU kaj RERS.

Semajno de ĉiĉeronado en la regiono Anĵuo okazis de la 16a ĝis 22a de julio kun 12 partoprenantoj. Catherine Kremer ĉiĉeronis, Jannick Huet staĝestris.

La 30-a Internacia E-Konferenco de OSIEK sub la temo « Esperanto en Artoj » okazis du la 21a ĝis 27a de julio kun 16 OSIEK-anoj. Xavier Godivier staĝestris.

Samtempe, de la 9a ĝis 27a de julio, t.e. dum 18 tagoj, okazis maratona E-kurso kun Perla Mielo, Louis Jeuland, Nina Korĵenevskaja kaj Mikaelo Bronŝtejn kiel instruantoj kaj 11 lernantoj, kiuj restis inter 5 kaj 18 tagoj.

La 8an festan semajnon por infanoj kaj familioj, de la 11 ĝis la 19a de aŭgusto, kun Bert Schumann kiel staĝestro, Nicky Janssen, Ansofi Markov, Larisa Osadĉuk, Anastasia Ermakova, Alain Delmotte kaj Jean-Luc Kristos kiel animantoj aŭ instruantoj, ĉeestis 43 homoj, inter kiuj 18 infanoj kaj junuloj 1- ĝis 22-jaraj.

Tiuj ĉi kvar staĝoj kunigis 126 homojn. Kuiris Thierry Charles.

Dum la eŭropaj tagoj de kulturheredaĵo je la 15a kaj 16a de septembro, tagoj de pentrado kaj ekspozicio de pentraĵoj okazis krom vizitoj de la bieno.

La 7an staĝon AŬTUNE, de la 27a de oktobro ĝis la 4a de novembro, staĝestris Bert Schumann kaj Jannick Huet, kun Dennis Keefe kaj Elisabeth Barbay kiel ĉefaj instruanto kaj animanto. Samtempe, de la 31a de oktobro ĝis 4a de novembro, Zdravka Lenepveu gvidis la ĥoron Interkant kiel ĥorestro. --- Inter la 60 ĉeestintoj troviĝis 24 staĝanoj, el kiuj 10 infanoj 4- ĝis 14-jaraj, 4 manlaborantoj kaj 20 kantistoj de Interkant. Kuiradis Thierry Charles. --- Kadre de la asocio Kampo de la Griloj, Isabelle Nicolas organizis la 3an de novembro « vesperon de fabeloj, legendoj kaj tremigaj historioj el Baŭge-ujo », kun ĉeesto de dekvino da Baŭge-anoj. Kadre de Interkant, Jannick Huet organizis la 4an de novembro en la preĝejo de Baugé koncerton kun 2 aliaj ĥoroj de la regiono.

Sume, dum la jaro 2018, la 52 tagojn de tiuj staĝoj vizitis 279 homoj (278 en 2017, 254 en 2016, 242 en 2015, 204 en 2014) kun 4.136 manĝoj kaj 1590 tranoktoj.

Ni memorigas, ke la prezoj de niaj staĝoj ne altiĝis ekde dek jaroj kaj ke duontarifo aplikiĝas por infanoj, junuloj, senlaboruloj kaj personoj kun malgrandaj vivrimedoj, celante favorigi la vizitadon de esperantistoj. Bonvolu informi pri tio viajn konatojn.

Luigoj

Jam la sesan jaron la kulturdomo financas sin per luigo al privatuloj. La 22 luadoj enspezigis entute 35 940 € malnete (inkl. AVI). Ni reklamas la kastelon en pluraj retejoj pri luado al grupoj kaj en la turisma oficejo. Ni provas altigi la lu-enspezojn per regula adapto de la prezoj laŭ diversaj periodoj. La ĉambrojn antaŭ la ludonoj kaj staĝoj purigis Amélie Sourice kaj foje Paŭlino Gaborit.

Unufoje luprenis e-istoj por familia festo. Trifoje luis asocioj de teatrumado. Unufoje skolta grupo ĉeestis senkoste kontraŭ eksteraj laboroj. Okaze de la « 2aj tagoj de la poezio en Baugé-en-Anjou », Isabelle Nicolas organizis en la kastelo poezian vesperon kaj tranokton de la laŭretoj.

Konstrulaboroj

Dum 73 tagoj, labortage aŭ semajnfine, volontulaj laborantoj daŭrigis la komencitajn konstruojn.

La plej grava laboro inter printempo kaj aŭtuno estis la konstrado en la verando de necesejo adaptita por handikapuloj kun rulseĝulo (PMR). Tiujn laborojn realigis volontuloj por kosto de 2 000 € por la aĉetita materialo. Post tio, ni decidis kaj lanĉis la laborojn por rulseĝula dormĉambro en la nuna bindejo.

Ekstere daŭriĝas forigo de la invademaj bambuoj kaj laŭroj, zorgado pri la 235 poploj kaj beligo per florbedoj.

Kiel lasta parto de la antaŭgardaj riparoj, ŝtontajlisto kaj tegmentisto restaŭris la orientan kamentubon super la ĉambro 23, la okcidentan kamentubon super la biblioteko, la volboŝtonojn de la fenestro de la ĉambro 24 kaj farigs la purigon de la ŝtonoj de la maldekstra angultureto, por totalo de 14 300 €.

Ni danku René Jelenc, Yves Couturier, Frédéric Lauriol, Bert Schumann & Jannick Huet, Brigitte Ardon, Claudie & Dominique Bureau, Emmanuel Morin, Francis Bedon, François Lo Jacomo et Nathalie Kesler, Geneviève Bouilloud, Gilles Tirard, Guillaume Lanier, Isabelle Nicolas, Ivan Lafitte, Jean-Jacques Moreau, Michel Cousin, Ugo de Maubeuge & Isabelle Nicoloso, kiuj partoprenis la diversajn semajnfinojn kaj volontulajn konstruejojn.

Dungoj

Sekve al nia kandidatiĝo, la organismo FONDES akceptis dosieron 'Dispono Loka de Akompano' kun buĝeto de 4 300 €. Ekonomia studo estis realigita inter julio kaj novembro kun konsilistino kaj teamo de la Kulturdomo por evoluigi la Kulturdomon kaj krei laborpostenojn.

Tiu studo kondukos komence de 2019 al propono dungi personon por zorgi pri la luoj, la purigo de la kastelo kaj la kuirejo dum la staĝoj, kaj al dungo per honorario de aferalportanto, kun la celo duobligi niajn enspezojn por financi la tegmentlaborojn fariĝantajn urĝaj.

Financa raporto

Por la jaro 2018, la sumo de la enspezoj atingas la sumon de 90749 €, do 2 % pli ol en 2017 sed 10 % malpli ol en 2016. La staĝaj enspezoj pliiĝis: 46184 € anstataŭ 38772 € en 2017. La altiĝo okazas precipe pro pli granda mendo de unupersonaj ĉambroj kaj pro luo por fajrobrigadaj infanoj kiu kalkuliĝas staĝo, ĉar ili manĝis kaj loĝis samtempe kiel la staĝanoj.

Ni sukcesis atingi novan ŝtupon en la prizorgado de la kastelo (renovigo de la kamentuboj kaj volboŝtono de ĉambro 24) kontraŭ entute 14300 €, plene financataj per la jaraj enspezoj. La kostoj malaltiĝis koncerne salajrojn kaj socialajn kostojn, iom altiĝis la energikostoj, malaltiĝis la manĝokostoj kaj stabilas la impostoj kaj taksoj.

Investoj realiĝis por 1711 € (WC PMR) kaj 800 € (ŝanĝo de gazplako).

La sumo de la kostoj, lu-maklerajoj kaj vojaĝkostoj estas stabila.

La societa kapitalo altiĝis je 43992 € (-1008 € pro societaj partoj A kaj + 45000 € pro societaj partoj B). Tio ĉi ŝuldiĝas precipe pro akiro de societaj partoj B sekve de la alvoko al donacoj farita por konstruo de ĉambroj PMR.

La ĉapitro "aliaj vendoj" malaltiĝis, kun altiĝo je 10 % je la libro-vendado (1275 €).

Koncerne disponeblan monon, ni havis je 31/12/2018 entute 204353 €, el kiuj 11696 € en ĉekkontoj, 175661 € en ŝparkontoj kaj 16996 € kiel societaj partoj de la banko Banque Populaire.

La bilanco montras profiton je 9329 € post imposto (1505 € en 2017). Tiu ĉi profito rezultas el malpliigo de la kostoj (salajroj kaj manĝaĵoj).

La financaj tabeloj (bilanco, spezkonto, buĝeto) ne estas senditaj kun ĉi tiu kunvokilo: ili estos publikigitaj sur nia retejo kaj estos disdonitaj dum la jarkunveno.

Somera programo 2019

- 2019-julio-08/18 : 3-a Maratona Esperanto-kurso kun Dennis Keefe, Marion Quenut
- 2019-julio-08/18 : 5-a Interŝanĝoj de scioj kaj faroj (franclingve)
- 2019-aŭg.-06/16 : 9-a Festa Semajno por infanoj kaj familioj

Vi povas informiĝi pri niaj staĝoj kaj aliĝi diversmaniere:

- en nia retejo sub: gresillon.org/agendo kaj: gresillon.org/aligho
- per retmesaĝo al: kastelo@gresillon.org
- per telefonvoko al: +33-2 41 89 10 34 (aŭtomata respondilo), +33-6 51 24 24 23 (Bert)
- per poŝta letero al la sekretario: Schumann/MCE, 9 rue du Couradin, 35510 Cesson-Sévigné

La Kulturdomo de Esperanto bezonas vian helpon!

Bonvolu aliĝi kaj aligi viajn amikojn.